



La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia januara kunveno

Dato: Vendredon, la 20-an de januaro 2006, 6:30-9:00 pm

Loko: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

Programo: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Nijl Blonstein parolos pri siaj spertoj
en la Esperanto-movado en Brazilo. ★

Protokolo de nia Zamenhofa Festo, la 16-an de decembro 2005

La decembra formala kunveno estis nia ĉiujara Zamenhofa Festo. Kiel ĉiam, estis multe por manĝi kaj trinki, estis muziko kaj konversacio. Stuart GREEN malfermis la kunvenon per bonvenigo al la ĉeestantoj. Entute kunvenis 20 homoj, inkluzive gaston de Ŝijimin, Yalan ZHAO.

La kunvenintoj akceptis la kandidataron prezentitan de la kandidatiga komitato por la jaro 2006. Kiel prezidanto restos Stuart; la nova vicprezidanto estos Nijl BLONSTEIN; Tomaso ECCARDT estos la nova program-direktoro; Sofiya SOSKINA daŭre tenos la postenon de kasistino; Rochelle F.

GROSSMAN denove estos la korespondanta sekretariino; Jim MEDRANO daŭre estos redaktoro de *Prismo*; kaj Jeff BLAKESLEE ankoraŭ estos protokolisto. Stuart kaj la grupo dankis Maki SANO pro ŝia laboro kiel program-direktorino dum 2005.

Kelkaj anoncoj sekvis. Tomaso invitis personojn prelegi dum venontaj kunvenoj. Kiu interesiĝas prelegi, tiu bonvolu paroli kun li pri temo kaj tempo. Tomaso ankaŭ anoncis, ke lia elementa Esperanto-kurso ĵus finiĝis. Li diris, ke se li aŭdos de personoj kiuj volas komenci lerni Esperanton, li eble komencos novan elementan kurson. Li

ankaŭ diris, ke eble okazos meza kurso se estos intereso. Plue, li proponis la eblecon de rekomenci la konversaciajn rondojn dum la venontaj monatoj.

Poste, Tomaso anoncis pri progreso en planado de la venonta ELNA Jarkongreso en Novjorko. Li diris, ke la planantoj preskaŭ fiksas la lokon de la kongreso kiel FIT (Fashion Institute of Technology). Li afirmis, ke la kunvenejo de FIT estas bela kaj renovigita de post la lasta ELNA-kongreso tie. Ankoraŭ, tamen, restas laboro por trovi sufiĉajn loĝejojn por la kongresanoj.

(daŭras sur paĝo 2)



IBM Plaza

La 8-an de januaro, naŭ novjorkaj geesperantistoj kaj unu sveda kunvenis ĉe IBM Plaza. Leif NOR-DENSTORM vizitis nian grupon kaj donacis al la Societo ekzempleron de sia vikinga libro por infanoj. Li estas pastro kaj la konversacio tememis

Feliĉan Novjaron! pri religio. ★
– Tom ECCARDT



Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Januaro 2006

20

ESNY KUNVENO

Nijl Blonstein parolos pri siaj spertoj en la Esperanto-movado en Brazilo

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

Februaro

5

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza
(Limdato por kontribuajoj por Prismo 151)

ESNY KUNVENO

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

17

United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

“IBM” Building Atrium
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

Pagintaj anoj de la Esperanto-Societo de Novjorko 2005

Hilda Aronson	Hortense Howell-Barber	Thomas Morgan
Lynn C. Bartlett	Mitsutaka Inui	Carlos E. Ortiz
George Baker	Pierre Jelenc	Daniel M. Perlman
Ulrich Becker	Renata Kaczmarska	Zsuzsa Polgar
Wendy Bell	Alex Karkovsky	Mary Pulley
Marta L. Bergonzoli	Susan D. Kohn	Lillian Rachele
Jeff Blakeslee	Ernest E. Kovary	Pilar Rau
Neil Blonstein	Chong-Yeong Lee	Douglas M. Rose
Arthur Bonetti	Martin Levine	Maki Sano
Paul J. Burke	Pamela Lieber	Isolde Schehr
E. Semra Ĉelik	Jonathan Liechty	Sofiya Soskina
Richard Connell	Jan D. Long	Witold Symonovicz
Thomas Dickson	Cecile Low	Gloria Taylor
Margot H. Gerson	Robert Mahler	Humphrey Tonkin
Thomas Eccardt	Eugene Markov	Arnold Victor
Irene Ginsberg	Emily Medrano	Sheppard Wahnnon
Stuart M. Green	Jim Medrano	Doris Wheeler
D. Gary Grady	Nancee Medrano	Maurice J. Wittenberg
Rochelle F. Grossman	Rebecca Medrano	Tomoko Yamashiro-Petrov
Takaki Julian Hashimoto	Laura Miller	Sumo: 59

Krome, 9 personoj aŭ grupoj abonis Novjorkan Prismon. ★

Zamenhofa Festo (de paĝo 1)

Stuart poste memorigis la ĉestantoj pagi la kotizon por 2006.

Sekvis prelego de Alex KARKOV-SKY pri monumento de Zamenhof, en la urbo Odeso, kiun skulptis Nikolaj BLAĴKOV en 1959. Tiam Odeso estis en Sovet-Unio, kaj alia monumento al Zamenhof ne ekzistis ie ajn en tiu lando. Fakte, pro “mensogo por savo” de Aleks, la aŭtoritatoj de tiu tempo kredis, ke la statuo reprezentis la avon de la skulptisto, heroon de la kontraŭfaŝista milito! Tial oni permesis al BLAĴKOV starigi la skulptaĵon en sia privata korto. La monumento ankoraŭ staras tie.

Ankaŭ dum la festo, Tomaso legis elĉerpaĵon el teksto de Zamenhof pri la religia ideo homaranismo, kaj muzikis Nijl kaj Ŝijimin, kun akompano de la festantoj.

Je la naŭa horo Stuart oficiale fermis la kunvenon. ★

Protokolis: Jeff BLAKESLEE

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Stuart Green
(631) 751-5683

Koresponda Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Jeff Blakeslee
(718) 383-2715

Vicprezidanto
Nijl Blonstein

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 738-6084

Program-Direktoro
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Novjorka Prismo

Numero 150 – Januaro 2006
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2006 Esperanto Society of New York